

La Esperanto-Gironde Informilo

SEPTEMBRO 2020



N° 162

Ĉu al brila franda nova mondo?



MEMOROJ PRI LA DEVIGA HEJMRESTADO

VIVO TRA LA VITRO

De kiam ni devas hejme kontentiĝi partopreni en la vivo de nia kvartalo tra fenestroj, mi rimarkis, ke Garono ĉiam fluas. Arboj verdiĝis kun novaj printempaj folioj, kiam el aliaj falis teren iam belaj floroj. Birdoj pli bone aŭdigis siajn ĝojajn pepadojn sen la bruo de veturiloj. Verŝajne naturo plene – eĉ pli bone – vivadas sen ni, kiuj ne ĉiam noble traktis ĝin.

Homoj, feliĉe, nuntempe daŭre povas komuniki inter si dank' al komunikiloj kreitaj de ili. Ekzemple: ĉiumatene unu el miaj filinoj telefone sendas bildmesaĝon prefere humuran. Unu el ili, kiun mi memoros, estis foto de nia Prezidento, kun blanka hararo kaj faltoj diranta: «Estas fino; vi rajtas eliri». Ĝi efike ridigis min en tia neatendita aventuro, kiu limigas nian kutiman sed ŝatatan vivmanieron.

Martine

(en Bordoza, la 18-an de aprilo 2020)



PRI LA NUNA IZOLIĜO KAJ POSTE

Por mi, la decido de nia prezidento enfermi nin en niaj propraj domoj ne multe ŝanĝis mian ĉiutagan vivon. En kamparo, la izoliĝo povas okazi plenaere! Matene mi vizitas miajn kaprinojn kaj kokinojn; ili atendas min por ricevi nutraĵon. Antaŭ la tagmanĝo, mi regule biciklas ĝis St-Denis aŭ Guîtres por aĉeti «necesaĵojn» – panon kaj ĵurnalon – kaj ĉiusabate mi biciklas al Coutras por viziti la plenaeran bazon – feliĉe, la tiea urbestro oportune agis por ke ĝi restu malfermita. Estas okazo por sportumi kaj samtempe renkonti kelkajn konatojn; respektante la oficialan socian distancigon, kompreneble!... Posttagmeze, kiam estas bela vetero, mi laboras en mia ĝardeno. Sed, dum la paŭzoj... nepre necesaj!... mi legas kaj skribas. Mi havis la ideon kontakti per la reto multajn samideanojn tra la mondo por fari al ili demandojn pri la tutmonda epidemio. Kelkaj respondis. La prezidento de la E-grupo en Kopenhago klarigis al mi ke, pro la izoliĝo – pli milda ol nia – ili kunvenas per Skype. Li proponis al mi partopreni en ilia rondo. Estos sendube tre interese, sed antaŭe mi devas solvi la teknikajn problemojn! Do, eĉ se tiu ĝenerala enfermo al mi ne tro pezas, tamen du monatoj sufiĉos!... despli ke, bonŝance, la danĝera ĉina viruso ne tro ŝatas, ĝis nun, la kampanon kun freŝa aero kaj verdaj kampoj; kiuj baldaŭ estos flavaj dank'al la ranunkoloj!...

Sed, se mi ne tro suferas pro la nuna situacio, mi kompatas la familiojn, kiuj devas resti interne kun infanoj en malgrandaj apartamentoj sen balkonoj; ankaŭ por ili, du monatoj sufiĉos!

Post la 11a de Majo, la izoliĝo ne estos tiel severa, sed ankoraŭ ekzistos; kaj, laŭ nia registarestro, la afero povos daŭri... ĝis kiam? Eble ni estas je la komenco de granda aventuro; kun kelkaj ontaj ŝanĝoj, eĉ aliigoj, en nia socia vivo. Kelkaj diras, ke ili povus esti tre bonaj: inklino al sobreco, al solidareco, al kvieteco, al «dolĉa» moviĝo, al ŝparemo de niaj naturaj fontoj, al kampara vivo helpe de telekomunikado... Male, aliaj avertas nin pri malbonaĵoj: submetiĝo al la sanitara povo, kontrolgardo de la popoloj, kondiĉa libereco, ordonema demokratio, pere de diĝitaj iloj pli kaj pli uzotaj; kreskanta malriĉeco pro la ekonomia krizo... La plej malbona neniam certas; kiu vivos, tiu vidos!... Sed ni povas diri, ke ni travivas neordinaran epokon; eĉ historian!

Joël
(en aprilo 2020)



LA IZOLIĜO KAJ LA ĈERIZARBO

Car ni estas meze de kamparo, la nuna printempa izoliĝo malpli suferigas nin ol tiujn, kiuj loĝas vidalvide al sama konstruaĵo en pluretaĝa domo de la urboj.

Tra fenestro de la manĝoĉambro, ni bonŝancas ĝui verdan pejzaĝon de monteto, kie etendiĝas vitokampoj de najbaraj kamparanoj, kaj fronte al la fenestro de la kuirejo staras ĉerizarbo en la ĝardeno. Se ĉiujare laŭ la fluo de la tagoj ni kutimas ĝui ekaperon de la natura revigliĝo, ĉijare pro devigo, kiu limigas niajn delokiĝojn, ni certe pli longe kaj atenteme spektas ĝin.



Kiam komenciĝis la izoliĝo, la ĉerizarbo en la ĝardeno montris nur siajn nigrajn senfoliajn branĉojn. Tagon post tago, senhaste trinkante nian matenan teon en la kuirejo, ni pli longe rigardis eksteren tra la fenestro. Tiel ni vidis unue la floradon kaj la ĉerizarbo elegante blanke sin vestis. La floroj ne estis tiel nombraj, tamen antaŭsignis esperdonan fruktadon. Sekvis la unuaj delikataj folioj, kaj nia arbo milde verdiĝis meze de la blankaj bukedoj. Samtempe kun velko de la floroj, blankaj makuloj riverencis kaj cedis la lokon al vigla foliaro.

Ni gvatis la unuajn ĉerizojn, komence verdajn punktojn, kiuj iom post iom dikiĝis. Kaj tempo pasis... Venis tago, kiam la ĉerizoj komencis ŝanĝi sian koloron. Unue, apenaŭ sentebla diferenco. Poste nuancoj de rozkoloro grade pleningis la surfacon. De palaj la ĉerizoj pli ruĝiĝis sub la suno kaj ni gavis atendante tempon de ilia matureco, por frandi la sukajn fruktojn.



Subite printempaj pluvoj abunde akvumis dum pluraj tagoj kaj timemaj ĉerizoj ĉesis ruĝiĝi. Ni tamen vizitis ilin, subtenis ilin, gratulis ilin sed konstatis, ke pro forta pluvo ili fendiĝis kaj kelkaj iom putris. Tendo tamen gustumi forte puŝis nin. Kvankam plaĉis al ni la unua ĉerizo, mankis iom da sukero. Ni atendu.



Sed imagu, ke de tiu tempo, aliaj spektantoj montris sin. Pli kaj pli nombraj. Mokantaj merloj alproksimiĝis al la domo kaj ofte, melodie pepante, alte sidis sur la branĉoj. Korvoj forlasis la palisojn, kie ili staris en la vitokampo kaj pli ofte superflugis la ĉerizarbon. Pigoj havis plezuron lulmoviĝi sur la branĉoj... Kaj la plej karmezinaj ĉerizoj malaperis antaŭ ol ni havis tempon manĝi ilin...

lun tagon ni decidis pluki plenmanon da ĉerizoj el la facile atingeblaj, por esti certaj gustumi kelkajn. Ni konfesas, ke ili estis ne sufiĉe maturaj aŭ ne sufiĉe sukeraĵ. Kelkaj sunaj tagoj necesus por plibonigi la guston.

Matenon post mateno, trinkante nian teon, ni observadas nian ĉerizarbon kaj komentas, kion ni vidas: rondo de birdoj. Ili vicas unu post la aliaj kaj per propra maniero plukas ĉerizojn. Merloj estas la plej nombraj: virmerloj, tute nigraj kun flavaj bekoj, inoj kaj idoj pli brunetaj. Dum unua surflugas sur branĉon, alia iras teren, saltetas, gvatas, denove ekiras... Merloj bepkikas unu ĉerizon, tute senĝene forlasas ĝin kaj pikas alian, foje faligas ĝin subarben, plejofte ne manĝas tutan frukton, kaj fajfas. Ĉu por danki nin? Ĉu por alvoki siajn familianojn? Ĉu por signi sian plezuron?

Pego siaflanke vizitas la ĉerizarbon, ŝtelas unu ĉerizon kaj forflugas malpli melodie blekante.

Jen la dika korvo, kiu alvenas per forta flugilbato; ĝi rabas ĉerizon entute kaj denove ekflugas. Ne vidite, ne sciite! Sed ni vidis ĝin. Ruĝa ĉerizo ĉe la beko amuze klaŭnigas ĝin.

Nun unu upupo! Delonge ni ne vidis ĝin!

Siavice unu, du sturnoj? Ve! ĉu vere sturnoj? aŭ ina merlo? Eblas konfuzi. Do flava beko kaj kafbruna makuletita plumaro... Se vere temas pri sturnoj, tre baldaŭ alvenos multe pli kaj vespere restos eĉ ne unu ĉerizo en la arbo...

Subite stranga birdo montriĝas. La unuan fojon ni vidas ĝin ĉirkaŭ la domo. Kia surprizo! Viva flava plumaro, nigraj vosto kaj flugiloj, ŝajnas, ke estas oriolo! Eĉ vir-oriolo. Ĝis nun la nura, kiun ni vidis, staras sur nia horloĝo kaj kantas je la 9a. Ni dezirus foti ĝin. Sed ne eblas. Ĝi tre rapide moviĝas, duone kaŝas sin inter la folioj, ne lasas sin familiariĝi kaj tuj forflugas super la vitokampo ĝis la supro de robinioj, kie ĝi malaperas.

De antaŭ 18 jaroj ni loĝas ĉi tie kaj ni vidis birdojn, komence multajn, poste malpli, kaj malpli da specoj. Paserojn, ruĝvostulojn (fenikurojn), trogloditojn, sturnojn, garolojn, rubekolojn, verdajn pegojn, pigojn, korvojn, upupojn, turdojn, turtojn, strigojn, buteojn, sen forgesi paruojn, motacilojn, kardelojn, ktp. Sed oriolon, ĝis nun, neniam... Ĉu pro la izoliĝo de homoj naturo kaj bestoj rekonkeras spacojn profite al la sovaĝa vivo?



Klodin'
(en majo 2020)

PS: Konsiderante, ke la birdoj bone frandas la ĉerizojn, mi ne antaŭvidas eblecon kuiru partigotan ĉerizflanon por nia venonta rekuniĝo...

ATAKOJ KONTRAŬ ARTISTOJ EN TURKIO

SUBPREMA TURKIO: FORPASO DE LA KANTISTINO HELIN BÖLEK

Kuraĝon forĝis forto!

Memore al *Helin Bölek* el muzikgrupo *Grup Yourim*

La turkia povo lasis ŝin morti post 288 tagoj da malsatstrikio.



Helin Bölek kantadis rezistemon kaj revolucion en la muzikgrupo Grup Yorum kaj luktadis kontraŭ la diktatoreca reĝimo de R.T. Erdogan en Turkio. Ŝi forpasis la 3an de aprilo 2020 post 288 tagoj da malsatstrikio, dum ŝi estis perforte enhospitaligita far la turka polico ekde la 11a de marto. Ŝi, kiel ŝia samgrupano, la basisto Ibrahim Gökçek, ĝisfine daŭrigis tiun malsatstrikon, por denunci la truditajn cenzuron kaj perforton de la turka estraro kontraŭ ilia muziko kaj kontestado. La muzikgrupo Grup Yorum kaj Helin Bölek estas famkonataj kaj ŝatataj pro sia

engaĝiĝo en la sociaj movadoj enlandaj, kiel en Istambulo tiu movado de la placo Gezi aŭ en sia kvartalo Okhmaydani, kie ili animis kulturan centron. Ilia muzika engaĝiĝo vole favoras ĉiujn subprematajn popolojn en Turkio kaj aliloke. Eblas ĝin aŭskulti dank'al 25 albumoj, kiuj kunigas tradiciajn kantojn, repon, rokon kaj ĉiajn ribelajn muzikojn. La membroj de tiu grupo spertis enkarcerigon, ekzilon, multjarajn justicajn persekutojn, kaj plurajn akuzojn pro ligoj kun polikita grupo, marksista, leninista, taksita terorista de la turka estraro. La muzikgrupo Grup Yorum kaj la kantistino Helin Bölek per sia vivo pagas sian rezistadon fronte al la turka diktatura reĝimo. La membroj de la grupo daŭrigas sian malsatstrikon sub konstanta premado super ili kaj ilia muziko. Okaze de la entombigo de la kantistino en Istambulo, turkaj policistoj ĵetis larmigajn grenadojn sur la ĉerkosekvantaron. Helin Bölek forpasis 28-jara, por defendi liberecon kaj muzikon. Por ke pluvivu ŝia lukto, ni aŭskulu ŝian muzikon kaj ni subtenu tiun grupon, kiu persistas en sia ĝismorta alfronto kontraŭ la turka diktatura reĝimo!

Artikolo el GT Europe – le combat syndicaliste – ĉiumonata gazeto de CNT-F.

Tradukis Marcelo

Ligo al Koncertego de Grup Yorum en Istambulo en 2010 – Bella ciao:

<https://www.youtube.com/watch?v=Qwbh6ZHEiUc>

Pri belo inventaru:
Ribelu, kontraŭstaru!
Kulturojn plenumigu,
Vulturojn senplumigu!



Subpremas diktatoro,
Ekstremas strik' aktora.
En kor' ne velkos, vero!
la flor' de l' bellibero.



Necesas la muz-tikloj,
Ne ĉesas la muzikoj,
Sunkantas homamaso,
Kunskandas kromftrato.



Sveniĝas la artistoj,
Seniĝas je karn-histoj.
Kuraĝon forĝis forto,
Junaĝon for... ĝis morto!



Sed vivos plu animoj,
Aktivos flu' sen limoj.
Junaĝon sor... post morto
Kuraĝon forĝos forto!



MR, 1an de majo 2020

TURKIO: ERDOGAN, PLI MORTIGA OL VIRUSO

Inna Shevchenko
en *Charlie Hebdo* n-ro 1452 (20an de majo 2020)

Kovim-19 ne estas la nura viruso, kiu minacas la laboron de artistoj. Post amas-enkarcerigo de intelektuloj kaj verkistoj en Turkio, la reĝimo de Erdogan nun atakas muzikistojn.



«Mi volas vin aŭdi suferi baritone, ne soprane»

«Li volis gitarludi. Li volis esti libera daŭrigi sian arton. Li volis, ke la malpermeso de la koncertoj de Grup Yorum kaj aliaj revoluciaj artistoj ŝatataj de la popolo estu nuligita. La AKP⁽¹⁾, malamiko de la popolo, de la arto kaj de la artistoj, lin mortigis!» akuzas retmesaĝo larĝe diskonigita sur la turkaj sociaj retoj pasintsemajne, post la morto de Ibrahim Gökçek, la basisto de la plej ŝatata Grup Yorum, post 323-taga malsatstrikio. Unu monaton antaŭe, jam mortis la kantistino de la grupo, Helin Bölek, post 288-taga malsatstrikio.

Grup Yorum, kiu ekzistas de 1985 kaj estas fama pro siaj kanzonoj en la turka kaj la kurda lingvoj kontraŭ kapitalismo kaj imperialismo, ricevis malpermeson publike ludi en 2016 far la konservativa partio, AKP. La regantaj instancoj akuzas la artistojn, ke ili estas ligitaj kun la Revolucia Fronto de la Popolo (DHKP-C), rigardata kiel terorista organizo, kaj arestis plurajn membrojn pasintan jaron, inter kiuj Helin Bölek kaj Ibrahim Gökçek. Liberigite, la du muzikistoj daŭrigis sian malsatstrikion por peti la nuligon de la malpermeso publike ludi kaj la liberigon de du aliaj membroj de la grupo.

Laŭ pluraj lokaj fontoj, la polico malebligis aliron al la entombiga ceremonio de Ibrahim Gökçek uzante larmigajn gasojn kaj arestante plurajn homojn. La aliaj membroj de Grup Yorum, daŭre enkarcerigitaj, aperos la 20an de majo antaŭ tribunalo por respondi al akuzoj pri «terorismo».

(1) AKP: Partio por Justeco kaj Disvolviĝo; partio de Recep Tayyip Erdogan

En Francio prezidento Macron antaŭnelonge alparolis artistojn, kies profesion endanĝerigas la sanitara krizo, ĵetante pompan «Saĝo kaj kreemo, tio estas la franca genio». Enkarcerigante artistojn kaj ilin lasante morti pro malsato, prezidento Erdogan klare montras, ke nek saĝo nek kreemo estas bonvenaj en Turkio, kiun li regas. Kio do restas el la turka genio?

Tradukis Janine



KONTRAŬ NE NUR ARTISTOJ...

En Turkio, la advokato Ebru Timtik mortis post 238-taga malsatstrikio.



Ŝi petadis justan proceson, depost kiam ŝi estis enkarcerigita nur pro sia funkcio. Ŝi estis persekutita pro tio, kio ŝi estis. Jaŭdon, la 27an de aŭgusto, turka advokato, Ebru Timtik, 42-jara, mortis en malliberejo en sia lando. Ŝi estis komencinta malsatstrikon 238 tagojn antaŭe, por peti justan proceson.

Ŝia advokatejo tion anoncis sur la sociaj retoj, kelkajn horojn post kiam ĝi informis, ke kuracistoj provis ŝin revivigi per kora masaĝo.

Ebru Timtik estis kondamnita antaŭ unu jaro al 13-jara enkarcerigo pro «aparteno al terorista organizo», sed en realo ŝian profesion oni riproĉis al ŝi. Membro de la asocio de la Nuntempaj Advokatoj, ŝia fako efektive estis la defendo de politike danĝeraj kazoj.

La turkaj aŭtoritatoj akuzas tiun asocion, ke ĝi estas ligita al marksista-leninista-radikala DHKP-C, grupo, kiu faris plurajn atencojn kaj estas kvalifikita «terorista» de Ankaro kaj ĝiaj okcidentaj aliancanoj.

Ebru Timtik interalie defendis la familion de Berkin Elvan, adoleskanto mortinta en 2014 sekve de siaj vundoj ricevita dum la kontraŭregistaraj manifestacioj en Gezi, en 2013.

Pasintan monaton, la tribunalo de Istanbulo rifuzis liberigi Ebru-on Timtik, spite de kuracista raporto sciiganta, ke ŝia sanstato ne ebligas ŝin plu resti en malliberejo. Simila peto estis deponita ankaŭ en aŭgusto ĉe la Konstitucia Korto, sen sukcese.

Same kiel ŝi, ankaŭ ŝia kolego Aytaç Unsal malsatstrikas. Anstataŭ liberigo, Ebru Timtik kaj Aytaç Unsal estis translokitaj en du malsamajn hospitalojn en julio.

Ebru Timtik, kiu jam sorbis nur sukeritan akvon, infuzaĵojn kaj vitaminojn dum sia malsatstriko, pezis 30 kilogramojn je sia forpaso, laŭ ŝiaj proksimuloj.

Kelkaj dekoj da homoj atendis vendredon matene antaŭ la Konsilio de leĝa medicino de Istanbulo, kie la korpo estis nekropsiota, laŭ jurnalistino de AFP, surloke.

La morto de la advokato indignigis multajn elektitojn de opozicio. «Ebru Timtik estis sendita al morto antaŭ niaj okuloj», reagis je Twitter Sezgin Tanrikulu, deputito de la CHP (socia-demokrata). «Ni perdis ŝin pro la blindigita konscienco de justico kaj politikistoj. Ŝia nura deziro estis justa kaj honesta proceso», li aldonis.

El Huffrington Post, laŭ AFP (Franca Gazetara Agentejo), la 28an de aŭgusto 2020

Tradukis Janine



Konsternitaj reagoj post la morto de Ebru Timtik



KAJ NE NUR EN TURKIO...

Inna Shevchenko

En *Charlie Hebdo* n-ro 1468 (9an de septembro 2020)

Nasrin Sotoudeh, kiu estis kondamnita al tridek-tri-jara enkarcerigo pro sia laboro kiel advokato pri homaj rajtoj en Irano, komencis malsatstriki la 11an de aŭgusto. Ŝi petas la liberigon de la politikaj malliberuloj grave minacitaj pro la rapida disvastiĝo de Kovim-19 en la troloĝataj malliberejoj de Irano. Pasintan semajnon, la sanstato de la advokato, fama pro sia defio kontraŭ la leĝo pri deviga hiĝabo, grave malboniĝis. La aŭtoritatoj certe ĝojas pri tiu novaĵo: tio liberigos lokon en la triste fama prizono de Evin.

Tradukis Janine



Samkiel la tekstoj de Annie Ernaux kaj Leïla Slimani, publikigitaj en la antaŭa numero de LEGI, ĉi tiu de Maïwenn (Majŭen') fakte fontas el programero de France Inter, « Lettres d'intérieur », (*elinternaj leteroj*) en la matena elsendo. Augustin Trapenard tiam legas «leteron». Ĝin tradukis Janine Dumoulin kaj Marcelo Redulez.

Maïwenn estas aktorino, scenaristino kaj reĝisorino. Ŝian leteron ŝi alsendas al tiu, kiu filmis la murdon de juna nigrulo far kvar policistoj en Mineapoliŝo. Ŝi skribas la perforton, la ŝokon kaj la stuporon. Sed ankaŭ la esperon vidi alvenontan mondon pli justan, dank' al la videofilmetoj kaptitaj de niaj poŝtelefonoj.



En Parizo, la 27an de majo 2020
Al vi, kiu filmis,

Kiam mi ekrigardis mian telefonon hodiaŭ matene, estis la 6a horo. Ankoraŭ tro fruis por legi la retan eldonon de la ĵurnalo Le Monde, ili eldonas siajn novaĵojn je la 7a. Tial mi ekvagis ĉe Instagram. Mi hazarde trafas Madonna-n. Kutime mi pasas, tedita vidadi ŝian botokson aŭ ŝian eksterordinaran vivon, sed tiam mi komprenas, ke unu filmeto ne koncernas ŝin, do mi spektas. Temas pri via filmeto, tiu pri la arestado de iu viro en Mineapoliŝo, meze de posttagmezo.

Komence, mi ne komprenas, mi vidas policistaĉojn, tute ne ĝenatajn pro tio ke vi filmas ilin, dum ili surgrunde premas viron, kiu prezentas neniun rezistemon. La viro petegas ĉeson, li diras «*I CAN'T BREATHE, MI NE PLU POVAS SPIRI*», sed la policisto, kiu genuas sur lia kolo ŝajne ŝatas, ke vi filmas lin: li ŝveligas torson, rigardas vin rekte en la okulojn. Estas superrealisme.

Mi pensas, ke mi verŝajne miskomprenas, ke mi maltrafis epizodon! Sekve vi alproksimiĝas al la policisto, vi staras eble je 1,5m de la surgrundigita viro kaj tiam mi malkovras, ke li estas nigrulo, kaj mi pensas «aĥ ne! Ili ne kuraĝu rekomenci...» Denove samtipa filmeto el Usono, kie polico mistraktas nigrulon... Vi daŭre filmas la surgrundigitan viron, kiu ne plu kapablas petegi. Liaj okuloj iom post iom fermiĝas. Gepasantoj hurlas al la policistaĉoj, ke ili mortigos lin, se ili daŭrigas. Ili diras «Kontrolu liajn korbatojn» sed la surgrundigita viro ne plu moviĝas... Ŝajnas al mi vidi pison flui sur la grundo. Vi filmas la vizaĝon de la policisto, lian identoŝildeton... Vi filmas ĉion. Poste alvenas ambulanco kaj la nigrulo estas ĵetita sur brankardon, kaj via filmo tie finiĝas.

Mi rapidas al usonaj novaĵoj por scii, ĉu la viro elsaviĝis kaj mi ne kredas miajn okulojn legante: la viro mortis.

Mi fermas mian telefonon. Mia ventro nodiĝis. Mi ĵus vidis, matene je la 6a, videofilmadon de murdo farita de kvar usonaj policistaĉoj meze de posttagmezo.

Minutoj kaj horoj pasas. Mi ne sukcesas pensi pri io alia.

Dum la 1990aj jaroj, kiel ĉiu ajn, mi spektis videaĵojn filmitajn nokte, de malproksime, kaj kaŝe.

Hodiaŭ, kio timigas, estas vidi, ke policistoj eĉ tute ne plu timas esti filmataj. Ili ŝajne eĉ fanfaronas.

Mi legas, ke la policistoj estis senprokraste maldungitaj, kaj ke ribel-kontraŭagadoj jam ekfajris en Usono. Mi ne scias, kiel reagi, ĉu esti fatalisma, ĉu pesimisma. Mi apartenas al tiuj homoj, kiuj bezonas konkludon por antaŭeniri. Foje estas ridinde sed estas tiel. Kaj kelkajn horojn poste, mi pensas, ke finfine estas dank' al niaj videofilmoj.

Nuntempe, ĉiu civitano havas kameraon en sia poŝo. Tiu kamerao eble iun tagon utilos kiel pruvilo por justico.

Antaŭtempe, jaroj necesus antaŭ ol tiu murdo estus juĝata kaj probable neniam estus kondamnita. Hodiaŭ dank' al nia armilo, nia telefono, la rasistaj policistaĉoj neniam plu estos kvietaj. Ni filmos ĉion laŭ ĉiuj perspektivoj. Ni kondamnos per bildoj, sonoj, zomadoj.

La nigrulo nomiĝas George Floyd, li estis die belega.



Manifestacio kontraŭ policistaj perfortaĵoj al nigruloj en Usono

KOMUNIKO DE LA SINDIKATO SOLIDARAJ — 01/06/2020

La vivo de la nigruloj valoras, samkiel tiu de la rasigitaj ĝenerale, en Usono, en Francio, ĉie.

Komunikaĵo de la sindikato Solidaires (Solidaraj) kaj Réseau syndical international de solidarité et de luttés (Internacia sindikata reto por solidareco kaj luktoj) – la 1an de junio 2020.

Black lives matter! Nigrulaj vivoj valoras!

La murdo de George Floyd far policisto la 25an de majo aldoniĝas al la listo de la nigruloj murditaj far policistoj en Usono jam de jaroj. Tion denunciadas jam de 2013 la movado Black Lives Matter (Nigrulaj vivoj valoras), apogite de pli kaj pli multnombraj sindikatoj en Usono. Jam en 2016 dum historia striko de la geinstruistoj de la sindikato CTU (Chicago Teachers Union – Unuiĝo de geinstruistoj en Ĉikago), la 1an de aprilo, la manifestacio finiĝis per mitingo, dum kiu unu reprezentantino de Black Lives Matter diskursis subtene al la geinstruistoj, kiuj strebadas altkvalite instrui al malriĉuloj, plej grandparte nigrulaj kaj Latinamerikaj, dum la polico de Ĉikago jam rekordis pri la nombro da murdoj de nigraj viroj kaj virinoj. En komunikaĵo post la murdo de George Floyd, CTU asertas: «ni daŭre diros #BlackLivesMatter Nigrulaj vivoj valoras!, postulos justecon kaj kulpigos la sisteman rasismon.» Ĉar vere temas denove tie pri sistema rasismo. Rasismo denunciata far multnombraj sindikataj organizaĵoj en Usono, kie de kelkaj jaroj sindikatoj denove turnas sin al sociaj demandoj, kiuj transiras la nuran korporatisman kadron. Tiel en Mineapoliso, la sindikato Minneapolis Federation of Teachers (geinstruistoj) klarigas, ke 20% el la geinstruistoj estas nigrulaj, dum 75% el la gestudentoj tiaj estas. La sindikato alvokas aliĝi al la aktualaj manifestacioj kaj subteni la gestudentojn, kiuj tien iras. Deklaraciojn postulantajn justecon por George Floyd redaktis multnombraj sindikatoj, inter kiuj Transit (ATU) Local 1005 (busoj), UNITE HERE!, CTUL, the Minnesota Nurses Association (geflegistoj), la St. Paul Federation of Educators, kaj National Nurses United.

La murdo de George Floyd, per la filmo de lia agonio sub la genuo de la policisto, horore memorigas, ke rasismo estas struktura en Usono, lando, kie la 13a amendo de la konstitucio, redaktita post la Usona enlanda milito kaj la aboligo de sklaveco, permesis kriminaligi vagabondecon – destino de la sklavintoj ĵus liberigitaj far sklavmastroj – kaj ĝin puni per enkarcerigoj kaj... punlaboroj... «Nenio ŝanĝiĝis!», hodiaŭ krias manifestaciantoj ĉie tra la lando. La superemistaj blankuloj daŭre senpune paradas, kun kapuĉoj kaj blankaj roboj en procesioj, subtenataj de Trump kaj lia kliko.

Neeviteblas hodiaŭ la komparo kun sinteno de polico en aliaj landoj. La murdo de Adama Traore en Francio en 2016 kaj la lastaj konkludoj de la jurmedicinfakuloj – kies fakoj fore rilatas kun la kaŭzoj de lia morto – montras volon silentigi la aferon, kaj malkulpigi la policistojn.

En Usono, la aktualaj manifestacioj okazas dum kronviroza periodo, kiam malriĉaj, nigrulaj popolanoj, en certaj kvartaloj estas forlasitaj, sen flegado, kun rekorda mortokvanto, ankaŭ sen provizado, sed kie polico daŭre senpune perfortas.

La policaj kontroloj, rasistaj insultoj kaj perfortoj en francaj kvartaloj dum la deviga izoligo kompreneble eĥas por francoj al la usonaj okazaĵoj. Ankaŭ franca polico ŝajne ĝuas senliman senpunecon, unuarange en la popolaj kvartaloj. Ankaŭ en Francio nigruloj estas viktimoj de rasismo kaj apartenas al la kategorio de la plej sendefendaj fronte al la epidemio. Inter ili, homoj sen oficialaj legitimaĵoj surstratiĝis, organizitaj dank' al la Marŝo por Solidarecoj, por postuli egalrajtojn, loĝadon por ĉiuj, fermon de la Centroj por retenado, kaj reguligadon de ĉiuj Senlegitimaĵuloj. Spite al la malpermeso de la pariza marŝo, miloj da Senlegitimaĵuloj kaj iliaj subtenantoj manifestaciis aŭ kunvenis en pluraj urboj tra Francio. Ŝildojn kun «I can't breathe» (mi ne povas spiri) oni svingis solidare kun George Floyd kaj ĉiuj homoj, kiuj denuncas lian murdon en Usono.

La sistema, aŭ ŝtata rasismo, kiel ajn oni nomas ĝin, estas fakto en okcidentaj socioj, nur blinduloj tion ne vidas nun. Kaj dume ĝia veneno daŭre disvastiĝas kaj murdas!

Justecon por George Floyd, por Adama, justecon por ĉiuj viktimoj de policistaj perfortoj kaj rasismo!

La sindikato Solidaraj alvokas al amasa manifestacio mardon la 2an de junio je la 19asur la placego de la Pariza Tribunalo, por luktadi kontraŭ la skandala juĝeraro koncerne Adaman kaj al kuniĝo kun la iniciatoj solidaraj kun George Floyd kaj liaj proksimuloj.

Traduko far Marcelo



Manifestacio por justeco por Adama Traore

RILATE RIBELAJN KONTRAŬAGOJN

– el «La alia Usono» parolado de Martin Luther King en la universitato de Stanford la 14an de aprilo 1967.



« Mi opinias, ke Usono devas kompreni, ke la ribeloj startas ne sen kaŭzo. Certaj kondiĉoj daŭre ekzistadas en nia socio kaj ili estu kondamnitaj tiel vigle, kiel ni kondamnas la ribelojn. Lastanalize, ribelo estas esprimrimedo de tiuj, kiujn oni ne aŭdas. Kaj kion ne aŭdis Usono? Usono ne aŭdis, ke la malespero de la malriĉaj nigruloj pligraviĝis dum la lastaj jaroj. Usono ne aŭdis, ke ne estis tenataj la promesoj pri libereco kaj justeco. Kaj Usono ne aŭdis, ke granda parto de la blankula socio zorge-

mas pli pri sia kvieto kaj senŝanĝa stato ol pri justeco, egaleco kaj humaneco.

Konkrete la ribelajn somerojn de nia nacio kaŭzis la vintraj malfruoj de nia nacio. Kaj tiel longe, kiel Usono prokrastos justecon, ni statos pretaj por ripeti perfortajn kaj ribelajn ondojn pli kaj plu. Justeco kaj socia progreso estas absolutaj garantioj por preventi ribelojn. Mi certas, ke vi komprenis tiun ideon. Ĝi estas kvazaŭ ideo, ke io estas en la fluso de la tempo mem, kiu mirakle flegos ĉiujn malbonojn. Kaj mi multfoje tion aŭdis. Estas tiuj, kaj ili ofte estas sinceraj homoj, kiuj diras al la nigruloj aliancitaj kun la blankula socio, ke ni devus malrapidiĝi kaj simple resti afablaj kaj paciencaj kaj daŭre preĝi, kaj ke post 100 aŭ 200 jaroj la problemo mem solviĝos. Mi opinias, ke ekzistas respondo al tiu mito. Kaj ĝi estas, ke la tempo estas neŭtrala. Eblas ĝin uzi jen konstru-, jen detru-maniere. Mi estas absolute konvinkita, ke la fortoj de la malico en nia nacio, la ekstremdekstruloj en nia nacio, ofte uzis la tempon multe pli efike ol la bonvolemaj fortoj.

Verŝajne ni devos penti ĉi-generacie ne nur pro la acidaj paroloj kaj pro la perfortaj agadoj de la malbonaj personoj, sed ankaŭ pro la teruraj silento kaj indiferenteco de la bonaj personoj, kiuj krucas la brakojn kaj diras: «Atendu la bonan tempon!»

Iel ni konsciu, ke socia progreso neniam ligiĝas al fatalo. Ĝi estas frukto de nelacigeblaj klopodoj kaj de persistema laboro far sindonemaj homoj. Kaj sen tiu obstina laboro, la tempo mem iĝas aliancano de la primitivaj fortoj por la socia stagnado.

Ni do helpu la tempon kaj ni konsciu, ke ĉiam estas bona tempo por bone fari.»

<https://www.facebook.com/brutoficial/videos/2979229958857991/>

Tradukis Marcelo

SAT-HEREDAĴO: LA 3000-LIBRA BIBLIOTEKO DE LA MUELEJO

Fine de junio Jacky kaj Yves, ambaŭ neesperantistaj filoj de Kribo (Christian Baudé) sendis urĝan alvokon: la muelejo de Cargue-Sac en Bovilo (Beauville – FR-47470) estas vendota. Rapide SATanoj reagu por savi el detruo la tie postlasitajn esperantaĵojn. Efektive, Kribo, de post la morto de sia edzino Solange, pro psika malsano sidas en psikiatrejo. Kaj la jurista komisiito, kiu de nun estras liajn bienojn kaj bezonojn decidis forvendi la muelejon kaj la ĉirkaŭajn kampojn.

Kiuj reagis? Kiuj solvoj estis trovitaj por garantii pluan vivon al tiuj valoraĵoj trovitaj en forlasita stato? Kaj vi, kion vi proponus?

Unua vizito en la muelejo okazis la 19an de junio 2020. Akceptitaj de Jacky kaj Yves, Serge Sire, Klodin' Pomiról kaj Marcelo Redulez speciale tien veturis por taksi la amplekson de la afero. Tuj stariĝis la problemoj pri urĝeco, kvanto kaj celo de la forportotaĵoj. Poste evidentiĝis la malordo kaj malpureco de la lokoj. Ni ne dubis pri tiea abundeco de valoraĵoj (valoraj ofte nur por esperantistoj!). Ni jam tre bone konis la muelejon kaj ĝiajn enloĝintojn. Tamen ni ankaŭ sciis, ke almenaŭ de pli ol du jaroj mankis tie zorgado kaj de sep monatoj la muelejo restis tute vaka. Sekve telefone Jacky anoncis, ke rabistoj jam ŝteleme malordigis ĉiujn ĉambrojn kaj forportis aĵojn. Sed ankaŭ ronĝuloj (musoj, ratoj, gliroj), birdoj kaj trapluvo post fulmotondrego difektis meblojn kaj aparte diskojn, librojn kaj dokumentojn. Tiun parton rezigne ni lasis.

La surloka konstato estis malfacile akceptebla. Tiuj, kiuj konis tiun muelejon vivantan kun la spriteco de Kribo, kun Solange postkuranta anasojn, kun gajaj esperantistoj somerumantaj en tiel bela, bona, senzorga etoso, kun infanoj libere petolantaj sur kamparo, sentis korporemon pro tiu aflikta spektado de forlasita kvazaŭruino. La reago estis: nepre trovi solvojn por pluvivigi la trezoron postlasitan de Kribo, kiu dediĉis sian tutan vivon al la movado. Se ni celas forporti kiel eble plej multe da libroj kaj dokumentoj, ni bezonos helpemajn brakojn de volontuloj, amason da skatoloj, plurajn veturilojn aŭ se eble kamioneton, kaj fine lokon aŭ lokojn, kien transporti la tuton. Dum la sekva semajno estis organizita la savado. Al la ĝenerala alvoko respondis nur kelkaj kamaradoj.

Tiel sabaton la 27an de junio kuniĝis grupeto por la selektado kaj pakado de la «heredaĵoj». Al Monique Dussenty, Klodin' kaj Marcelo ankaŭ aliĝis Céline kaj Manon, lia fratino kaj ties filino, kaj krome Guy Cavalier kaj Florence. Ĉi-lastaj speciale fruege matene veturis el Parizo per propra aŭto. Dum la tuta tago, dum dekdu laborhoroj, kun nur mallonga tagmanĝa paŭzeto, la grupeto aktivadis. Inter la skatoloj, alportitaj el la kuirejgo, kie deĵoras Marcelo, distingiĝis la franclingvaj kaj la Esperantaj enhavoj. Alia distinga signo: el la bibliotekoj de Denise Castello aŭ el Kribo-kolektoj.

Laŭkvante laŭ hodiaŭa taksado ĉirkaŭ tri mil libroj kaj dokumentoj estis tiel savitaj.

Pli malpli duono estis transportita 800 km-ojn nord-okcidenten for en la hejmon de la nuna SAT-prezidanto – ĉe Vinko kaj Claudine – : ĉiujn verkojn donacitajn de Denise Castello kaj krome gravan parton de la Esperantaj libroj kolektitaj de Kribo. En Morlaix dum tuta semajno Marcelo kaj Klodin' senpolvigis, viŝis, seninfektigis kaj registris kiel eble plej multajn verkojn el la stoko. Kaj helpe de pluva kaj malvarma vetero (bretona!), kiu ne vokis al ekstera, somera promenado, la deĵoro estis diligenta. La millibra biblioteko de Denise Castello estis komplete traktita kaj registrita. Tamen restas tie plu traktendaj ankaŭ libroj kaj arkivoj de Kribo. Tuta kofro plenplenas kaj bone ŝirmite atendas pli malfruan zorgadon. Eble venontan someron... aŭ la postan. Nenio plu urĝas nun tiurilate.

Ĉirkaŭ kvarono de la heredaĵo konsistas el Esperantaj arkivoj kaj pluvendebla stoko da SAT-broŝuroj: ili plenigis la aŭton de Guy kaj Florence. Nun ilin gastigas parte Guy en Rueil-Malmaison, parte Juliette kaj Sylvie Ternant en Epinay-sur-Seine.

Kvankam estis plenŝargitaj du aŭtoj kaj unu ĉaro, pro troa kvanto kaj pezo Yves transprenis por posta transporto ĉe Klodin' kaj Marcelo la lastan kvaronon. Reveninte el Bretonio, Marcelo pasigis plurajn semajnojn por trakti, senpolvigi kaj listigi ĝin. Ĝi konsistas el franclingva kolekto de libroj esence pri anarkio kaj socipolitikaj vidpunktoj kaj agadoj. Ankaŭ pri ekologio kaj edukado. Aliaj pri sciencoj, biologio kaj filozofio. Tiu pli malpli 750-opo lokiĝas momente ĉe Klodin' kaj Marcelo. Sed poste?

Post analizo de tiu inventaro, montriĝas ke tiu heredaĵo konsistas el broŝuroj, libroj, arkivoj de Kribo mem sed ankaŭ plenaj bretoj da libroj donacitaj de pluraj gekamaradoj: Denise kaj Henrique Castello, Gaston Fournier, Valo (Raymond Laval), Suzanne Calas, Edmond Dazun, Piedrafito, inter aliaj. Nur kelkaj titoloj pluroble troviĝas. Multaj estas malnovaj eldonoj, kelkaj eĉ el la 19a jarcento. Evidente plej grandparte papero flaviĝis kaj estis punkte makulita, signoj de la tempo.

Se eblas konsideri, ke la heredaĵo estas nun savita, la afero ne finiĝis, male. Neniu forgesu, ke la stokejoj devis urĝe esti trovitaj sed estas nur la unua paŝo kaj provizora solvo. La celo estas pluvivigi la heredaĵon, konservante kiel eble plej trafe la intencon, spiriton de Kribo, do trovi lokojn, bibliotekojn, kie interesatoj povus konsulti la verkojn. Koncerne la esperantaĵojn, eblas esperi kalkuli kun helpemaj gekamaradoj, kiuj baldaŭ montriĝos, ne nur por konsili sed ankaŭ por mem agi. Ili bonvolu manifestiĝi.

Pri la malnovaj franclingvaj eldonoj, interesa indikaĵo povus esti unue esplori tra la reta BNF (nacia franca biblioteko), ĉu la verko estas jam skanita, kaj noti la

daton de eldono komparante ĝin kun tiu, kiu troviĝas en la registrita listo de la somero. Poste, la dua paŝo estus kontakti la BNF por demandi, ĉu kelkaj libroj estas aldonindaj al ĝiaj arkivoj.

Sed tiu laboro postulas starigi skipon da volontuloj (multe pli ol du), kiuj pretas dediĉi tempon por trakti la 1768 librojn. Tio postulos certan daŭron... Interesatoj bonvolu kontakti Klodin' por aranĝi taskaron. Ĉu tio ŝajnas efektivebla? realigebla?

Isabelle Jacob sugestis kontakti la CIRA (Centre International de Recherche sur l'Anarchie) por transdono de tiutemaj franclingvaj libroj.

Kaj vi, kian solvon vi proponas por pluivivigi la valoraĵojn el la biblioteko de la muelejo?

Marcelo kaj Klodin'

La listo de la 1768 jam registritaj libroj estas je dispono de ĉiu interesato, kiu petos ĝin al [marcel.redoulez\(helik\)wanadoo.fr](mailto:marcel.redoulez(helik)wanadoo.fr)



NIAJ KURSOJ

PREFERE TELEFONU POR KONI LA KONDIĈOJN DE LA KUNVENOJ PRO LA EPIDEMIO

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attendant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukrupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

ENIGMO

La desegnoj, kiujn vi malkovras sur tiu paĝo ilustras la SAT-broŝuron *Esperanto or English* de Henriko Masson eldonita de Kribo en 1980. Ĉu vi divenos, kiu estas ilia aŭtoro?



Ĉu vi divenis? Ĉu la subskribo ne helpas vin?
La respondo vi mem trovu... aŭ legos en estonta numero de LEGI.

Marcelo

La rose de Chenini

Teksto de Grégoire Collon
(kromnomo de Laurent Gharibian)

Au cœur de la paume
A surgi la rose.
De son sable antique
La fleur de sagesse
Fait briller la main
Qui sut deviner
La beauté d'une âme.
Brisant les frontières
Deux regards intenses
Dialoguent au désert.
Le sourire des cœurs
Invite au silence.
Ils se sont rejoints
Ces deux univers
Dans le vrai langage
Lumière impalpable
Qui unit sans trêve
Les humains en marche.
Ils se reverront
Elle, automne clair
D'un pays nanti.
Lui, enfant-promesse
Dont le geste pur
A dit la grandeur
D'un peuple au futur
Déjà millénaire.

*A Isaline Remy,
Femme de l'être*



La rozo de Chenini (ŝenini')

Muziko de Catherine Bedez
Traduko de Marcelo Redulez

Sine de la polm'
Ekaperis roz'
El antikva sabl'
Floro de l' saĝec'
Lumas en la man'
Divensciinta
Belon de anim'.
Limojn rompjis for
Du rigardoj vort-
-umas en dezert'.
Korridet' invit-
-as al plensilent'.
Ja kuniĝis nun
Ĉi medioj du
Per lingvaĵ' de l' ver'
Nepalpebla lum'
Kunligant' sen ĉes'
De l' homar' sur voj'.
Ja revidos sin
Ŝi, aŭtunohel'
de riĉhava land',
Li, promes-infan'.
Montris pura gest'
Grandecon nu de
Popol' kun futur'
Plurmiljara jam.
*Al Isaline Remy,
Sent-intimulino*

Kontaktoj: laurent.ghabarian@gmail.com kaj
catherine.bedeze@gmail.com

Chenini estas troglodita vilaĝo berberparolanta, situanta en ŝtona dezerto je 18km for de Tataouine, sude de Tunizio. Ne konfuzu kun samnoma berbera, verdumanta oazo, situanta sud-okcidente de Gabès.




Noto de la verkinto pri la genezo de la poemo **La rose de Chenini**

Isaline Remy, poetino, verkistino estas ankaŭ ĵurnalistino. Tiufake ŝi vojaĝis kun pluraj preslaboristoj al Tunizio, pli precize al Chenini.

Post fino de la misio, ĉiuj sin retrovas sur bazaro por reporti memoraĵon en Parizon. Ŝiajn kunulojn tiam kaptas kvazaŭfurora konsumfebzo. Isaline siavice elektas... simplan paron da babuŝoj. La tre juna vendisto petas ŝian paciencon, eniras la butikon kaj revenas por redoni krommonon, akompanata de sia pli aĝa frato, al kiu tutevidente li parolis pri tiu neordinara klientino. Ankaŭ la granda frato fulme rimarkas ion nekutiman ĉe tiu eŭropdevena turistino. Reciproka impresio: silento, rigardoj, ridetoj. Tiam en la manon de sia klientino, la granda frato diskrete enŝovas sablorozon. Ĉio estas dirita.

Kelkatempe poste Isaline pertelefone rakontas al mi tiun kontakton, por ŝi surpriza, tiel intensa kaj konciza. Jen pure gracia momento gravurita en la memoro de la poetino. El la emocio, emananta el ŝia rakonto, mi provis kapti la esencon tra tiu mallonga poemo, unu-verŝe verkita en junio 2011 kaj kiun mi tie liveras kvazaŭ sen retuŝo.

Laurent Gharibian
Parizo, oktobre 2017



Enkonduko al la traduko **La rozo de Chenini**

Kiam Guy Cavalier proponis al mi traduki kanzonon *La rose de Chenini* kadre de projekto registri tiun kanzonon en diversaj lingvoj, mi konis nek la aŭtoron, nek la komponistinon, nek Chenini. Sed nur la ideo kunlabori al projekto de animantoj de Radio Libertaire kaj Radio-Esperanto jam forte logis min. Mi unue ricevis la tekston kaj tuj mi ĝuis la etoson. Mi jam antaŭsentis kelkajn versojn en Esperanto... tamen grave mankis la muziko. Ĝin mi ne ricevis. Longe atendis. Reziĝnis. Fakte mia troplenŝtopita jarkomenco ne lasis al mi tro da penslibero por verki. Eble tial mi ne postkuris la atenditan melodion por ĝustigi la ritmon de vortoj.

Sed antaŭ unu semajno Guy petis novaĵojn pri la traduko. Post rapidaj interŝanĝoj, per kiuj mi esprimis miron kaj bedaŭron, supozinte fiaskan forlason, alvenis la registraĵo de Catherine Bedez.



Post rapida ensorĉiĝo, mi sorbis la kanzonon kaj provis iom post iom traduki alfrontante la ĉiamajn problemojn de akcentitaj silaboj sur forta takto de la muziko. Tiu tre riĉa teksto ne tiel facile tradukeblas, kaj mi plurfoje devis ellasi detalon favore al la ĝenerala ideo. Tamen post pluraj reĝustigoj, nun kanteblas la ĉi-supra versio kaj mi esperas, ke ĝi redonas la esencon de la originalo.

Dankon al Guy, ĉar li pensis proponi tiun taskon al mi, dankon al Laurent kaj Catherine pro ilia fido. Mi antaŭĝojas, ke Esperanto estu lingvo aperanta sur ilia registrotrota disko.

Marcelo Redulez
Cambes, aprilo 2019



kapitalismo

Diru, Kial vi ne plu surhavas lanon?

Mi donis ĝin al ŝafisto por pagi la herbon.

Laŭdire la paŝtejo apartenas al li.

Li ne bezonas ĝin. Ni manĝas la herbon, ne li.

Jes, tamen li aĉetis la kampon.

Laŭdire.

Kaj kiel li trovis la monon por aĉeti tiun paŝtejon?

Vendante lanon.



Kukurba flano

kuirrecepto el sud-okcidenta Francio
prezentita far Klodin' Pomiro!

Por prepari tiun flanon por 4 personoj necesas kiel ingrediencoj:

- 1 cepo
- proksimume 600 gramoj da
kukurboj (po 150 gramoj
por ĉiu persono)
- 2 karotoj
- 1 ajla bulbero
- 70 ĝis 100 gramoj da raspita
fromaĝo (bovleto)
- kaf-taseto da faruno
- 2 ovoj
- 3 glasoj / 30 cl da lakto
- 5 cl da olivoleo
- petroselo
- salo kaj pipro
- laŭplaĉe spicoj, ekzemple kareo aŭ muskato ktp, sed ne devige.



Kaj vi bezonas kiel ilojn: kribrilon, profundan paton kaj profundan pladon por la forno.

Dum la preparado de la legomoj vi ekvarmigu la fornon je pli-malpli 200 gradoj.

Komence vi pretigu la kukurbojn. Post lavado fortranĉu la ekstremaĵojn. Duonŝeligu la kukurbojn. Sekve vi pecetigu ilin laŭ via prefero aŭ kubece, aŭ tranĉete, aŭ raspite. Metu ilin en la kribrilon kun salo.

Sekve vi maldike tranĉu la cepon. Kaj vi raspu la karotojn.

Fajne haku la petroselon kaj la ajlan bulberon.



En la pato kun iom da oleo fritigu la cepo-pecojn sen brunigi ilin. Aldonu la raspitajn karotojn, la kukurbojn, la petroselon kaj la ajlon. Kirle miksu la tuton kaj lasu ĝin kuiri dum 10 minutoj sur malvigla flamo. Atentu pri ĝi. Por eviti brulon, laŭ bezono aldonu duon-glason da akvo.

Dum tiu kuirado vi kirlu en saladujo la du ovojn aldonante la farunon kaj la lakton. Aldonu salon, pipron kaj eventuale spicojn. Laste enmetu la raspitan fro- maĝon. La preparaĵo estas iom likva kiel krespo- aŭ frit-pasto.

Nun enmiksi la enhavon de la pato en la paston.

Oleigu la fornoplado kaj verŝu la preparaĵon en ĝin. Enfornigu. Kuiru en la forno je 200 gradoj dum proksimume 45 minutoj.

Bonan apetiton!




Eble ankaŭ vi bonvolus kunfrandi personan recepton kun la legantoj de LEGI.

Ne hezitu ĝin sendi al esperanto.gironde@free.fr, kun belaj apetitvekaj fotoj!

La eskapema kukumo

*Teksto de Oktavo Mirbo' (Octave Mirbeau)
tradukita de la Cenona Sesopo
(Martine, Monique, Klodin', André, Marcelo, Gloria)*



La ĝardeno estis vasta, partigita en rektaliniaj kvadratoj, kaj traigita per larĝaj, herbokovritaj aleoj. Neniam, eĉ en delasita ĝardeno mi vidis tian ĥaoson. Multkoloraj platbandoj, bedoj, neniam refreŝigitaj, nek per ŝpato, nek per humila pioĉeto, prezentis nepriskribeblan vidaĵon de plantoj interplektitaj unuj en aliaj, tiel ke ne eblis ilin distingi. Plie ĉio estis flaviĝinta, brulbruniĝinta, surŝutanta la malmolan teron, konkuranta kontraŭ trudherboj pri la ioma malsekeco restinta en la sunbruligita grundo.

- Ha! Vi amuziĝos, diris Ulĉjo Hortus...

Li haltis antaŭ bedo, sin klinis, flankenpuŝis kelkajn sekajn tigojn de floksoj.

- Jen! Tie! diris li... Ha! Kia komika, tia eskapema kukumo! Laŭvide nenio rimarkinda... Sed kiam oni volas ĝin preni... ĝi eskapas... diablen forfuĝas... ne eble enmanigi ĝin...

Ulĉjo Hortus plu serĉadis tra la plekto de la flaviĝintaj tigoj, kiujn li bruskamane flankenpuŝis.

- Nu, mi ne vidas tiun ĉi krudulon... kie ĝi kuŝas? Certe ĝi vagas... Ĉiam same... Kiam oni venas por ĝin vidi, ĝi ĉiam malestas...

Kaj turnante sin al mi, li diris:

- Tamen kiel kurioze! Kukumo!... Ni iomete atendu, ĝi baldaŭ revenos.

Mi ne sciis, ĉu Ulĉjo Hortus estas vere freneza aŭ ĉu li celas mistifiki min, kaj mi pretis ĉesigi mian viziton, kiam subite la etulo sternis ventron sur la florbedo kaj kriis:

- Ha! kanajlo! Ha! fiulo!

Kaj mi vidis lian tuberplenan manon provantan stringi ion fuĝantan, ion longan, rondan kaj verdan, fakte similan al kukumo, kaj kiu, saltetanta, nekaptebla kaj diabla, subite malaperis malantaŭ tufo...

**La Cenona Sesopo 2018
(Martine, Monique, Klodin', André, Marcelo, Gloria)*

FINO



ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

**Materialon por LEGLI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

